

- Sugareva, Tekla & Vjara Atanasova. 1997. *Deutsch-bulgarisches Wörterbuch*. Zweite Ausgabe. Sofia: Atlantis.
- Uroić, Marija & Antun Hurm. 1994. *Deutsch – Kroatisches Wörterbuch*. Zweite Aufl. Zagreb: Školska Knjiga.
- Vasmer, Max. 1976-1980. *Russisches etymologisches Wörterbuch*. 3 Bände. Zweite unveränd. Aufl. Heidelberg: Winter.
- Vendryes, Joseph. 1959-1981. *Lexique étymologique de l'Irlandais ancien*. Dublin: Institute for Advanced Studies.
- Viereck, Wolfgang. 2001. *Pri la kulturhistorio de Eŭropo / Zur Kulturgeschichte Europas*. Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum V.3 (2000). Göttingen: Leins.
- Viereck, Wolfgang. 2004. "Laboristo, Arbeiter, ouvrier, workman, raboĉij, obrero, operaio – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo". *Scienca Revuo* 55: 163-178.
- Viereck, Wolfgang. 2006. "Tombo, Grab, grave, grob, sepolchro, tombeau, tumba – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo". *Scienca Revuo* 57: 25-34.
- Wendt, Heinz. 1995. *Langenscheidts Taschenwörterbuch Neugriechisch*. 22. Aufl. Berlin: Langenscheidt.
- Wolf, Siegmund A. 1960. *Großes Wörterbuch der Zigeunersprache (romani ŝiw)*. Wortschatz deutscher und anderer europäischer Zigeunerdialekte. Mannheim: Bibliographisches Institut.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Dr.h.c.mult. W. VIERECK
Obere Dorotheenstrasse 5a
DE – 96049 Bamberg
GERMANIO

<wolfgang.viereck@split.uni-bamberg.de>

Priaŭtoro informo

La aŭtoro estas emerita profesoro por anglaj filologio kaj mezepoka literaturo ĉe Bamberg-Universitato (Germanio) kaj orda membro de *Academia Europaea* (Londono) kaj efektiva membro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) Sanmarino. Li estis prezidanto de *International Association of University Professors of English*, de *Atlas Linguarum Europae*, de *International Society for Dialectology and Geolinguistics* kaj editoro de ĝia revuo "*Dialectologia et Geolinguistica*".



Taksado de dialekta parolo: apriora perceptaĵo de dialekto

Daiva ALIŪKAITĖ

Vilniaus Universitato,
Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHF)

1. Enkondukaj rimarkoj

La celo de tiu ĉi artikolo estas analizi taksadon, konceptadon de dialekta parolo aktualigante komprenon de dialekta perceptaĵo. La objekto de la artikolo estas: datumoj de anonimaj enketiloj de taksantoj de dialekto. Laŭ teoria aspekto en la artikolo oni apogiĝas sur tradicio de percepta dialektologio.

Unu el la komencintoj kaj flegantoj de la percepta dialektologio el Japanio Fumio Inoue kreis teorion de *dialekta perceptaĵo*. Kiel skribas la aŭtoro mem de la teorio, *dialektan perceptaĵon* eblas difini kiel socian psikologian (kaj regionan, kaj socian) perceptaĵon de dialekto [Inoue 1999: 147].

La kategorio de *perceptaĵo* enhavas unue la emocian rilaton de *naiva* taksanto kun la dialekto. Esence la perceptiva strategio de taksado de dialektoj estas plie ligita kun emocia taksado de variantoj. Eĉ pli aŭ malpli intelektaj decidoj pri konkreta dialekto estas destinitaj de la emocia rilato al malsama parolo. Do malgraŭ tio, ke reprezentantoj de la skolo de percepta dialektologio distingas inter *intelektaj* kaj *emociaj* karakterizoj [Inoue 1999: 149], ecoj de dialektoj, indikitaj de *la naivaj* respondantoj preskaŭ ĉiam estas pli aŭ malpli emociaj: pli ĝusta (la eco en percepta tradicio akceptindas kiel intelekta taksado) varianta ŝajnas tiu, kiu plie rememorigas denaskan varianton, aŭ estas varianta de granda urbo, pli proksima al la komuna lingvo aŭ estas alimaniere *markita*.

2. Trarigardo de empiriaj datumoj

2.1. Trarigardo de la enketilo kaj amplekso de la esploro

En la artikolo oni preparolas esploron faritan laŭ metodologio proponita de D. R. Preston, reprezentanto de la percepta dialektologio

[Preston 1989, 1999]. La naivaj taksantoj plenigis demandaron de apriora taksado de dialekta parolo. En ĝi oni volis ekscii:

1) kiel la naivaj taksantoj kvalifikos dialektan parolon rilate al la komuna lingvo laŭ kriterioj de:

- a) kompreneblo,
- b) ĝusteco,
- c) allogeco;

2) kiajn sociajn korelaciojn (ĉu konformaĵoj, juĝoj, opinioj) la naivaj taksantoj asocias kun dialekta parolo;

3) kiel la naivaj taksantoj limigas (aŭ ne limigas) diskurson de dialekta parolo;

4) al kiuj dialektaj ecoj la naivaj taksantoj estas plej atentemaj;

5) kun kiaj ecoj la naivaj taksantoj asocias dialekte parolantan subjekton.

Rimarkinde, ke la enketilo estas de miksita tipo, t. e. al respondantoj oni proponis skalon de taksado, tamen oni ankaŭ petis komentojn de la respondantoj – motivigi sian elekton. En la esploro partoprenis 50 personoj – 26 respondantoj de vira genro kaj 24 de ina genro laŭ deveno kaj loĝloko (98 %) estas okcidentaj aŭkŝtatoj (t.e., el la sama lingva regiono). Ĉiuj naivaj taksantoj apartenas al la sama aĝogruppo – havas 15-17 jarojn. (Aŭkŝtatoj estas unu el Litoviaj dialektanaroj.)

2.2. Trarigardo kaj analizo de perceptoj

Do, nur unu — 3,8 % el la respondantoj opinias, ke dialekta parolo estas *tute nekomprenbla*, ke *ili preskaŭ ne komprenas* dialekte parolantajn homojn asertas 25 % el la respondantinoj kaj 26,9 % el la respondantoj; *parte komprenas* — 70,8 % el la respondantinoj kaj 57,7 % el la respondantoj; *facile komprenas* — 4 % el la respondantinoj kaj 11,5 % el la respondantoj.

Resume pri la klarigoj de la respondantoj, kial ili nur parte komprenas aŭ preskaŭ ne komprenas dialektan parolon, distingindas du kaŭzoj:

- a) sociaj — ekzemple, *dialektan parolon ni malofte aŭdas, ĉar la homo ne estas al kutimiĝinta al dialekta lingvo (el malsamaj regionoj); ne ĉiuj havas eblon ĝin aŭdi* b) lingvaj — ekzemple, *ĉar alimaniere oni akcentas vortojn; ĉar foje vortoj aŭ prononco ne estas kompreneblaj; ĉar oni forglutas aŭ deformas finaĵojn.*

Ke dialekta parolo estas *regula* opinias nur 12,5 % el la respondantinoj kaj 7,7 % el la respondantoj; ke *ne tre regula* — 16,7 % el la respondantinoj kaj 46 % el la respondantoj; *tre neregula* dialekta parolo estas opiniata de 20,8 % el la respondantinoj kaj 15,4 % el la respondantoj; 50 % el la respondantinoj kaj 7,7 % el la respondantoj asertas, ke la dialekta parolo estas *nek regula nek malregula*.

Komentojn de la respondantoj oni ankaŭ povas dividi en du grupojn. T.e. unuaj respondantoj simple indikas, ke ĝi estas *alia parolo, ĉirkaŭantoj ne komprenas*. Eblas aserti, ke la kategorio de reguleco en ilia konscio unue ligiĝas kun klareco en komunikado. Aliaj indikas lingvajn kaŭzojn, kial ili dialektan parolon opinias ne plene regulan: *ne eblas apliki gramatikajn regulojn, oni uzas fremdajn vortojn.*

La kriterio de allogeco estas liginda kun atribuo de estetika valoro. *Hipotezo de denaska valoro* de Howard Giles, R. Y. Bourhis & A. Davies [Giles, Bourhis, Davies 1975] asertas, ke certajn variantojn de lingvo aŭskulti estas pli agrable.

Dialektan parolon kiel *allogan* taksas 16 % el la respondantoj, ke dialekta parolo *foje estas alloga* agnoskas 38 % el la respondantoj, *foje ne alloga* — 8 %, *tute ne alloga* — 24 %, *nek alloga nek malalloga* — 12 %.

La kaŭzoj, distingantaj tian taksadon, dividindas en du grupoj:

- a) estetikaj/malestetikaj spertoj, ekzemple, *ĉar dialekta parolo estas bela; ĉar ĝi estas bela; alloga en anekdotoj; ŝercanta, ĉar ĝi ridigas, ĉar ĝi sonas malagrabla;*
- b) kultura memkonscio, ekzemple, *aŭtentika, eksterordinara; ni scias, ke antaŭ multaj jaroj simile parolis multaj homoj; ĉar estas interese scii, kiel homoj parolas.*

Plej ofte respondantoj indikas, ke dialekta parolo asociiĝas kun regiono — 60 % el la respondantoj; kaj kun regiono kaj kun certa socia tavolo dialektan parolon asocias — 18 %; nur kun socia tavolo dialektan parolon asocias 14 %; 8 % opinias, ke destina faktoro ekparoli dialekte estas klareco, 16 % aktualigas diferencon de aĝo, asertante, ke dialekte parolas maljunaj aŭ almenaŭ pli aĝaj homoj.

Limigante la diskurson de dialekta parololo la naivaj taksantoj ne estas tre severaj — 54 % el la respondantoj asertas, ke dialekte oni povas paroli nur private kaj eĉ 38 % opinias, ke tiamaniere paroli eblas ne nur private, sed ankaŭ publike.

Indikante la ecojn laŭ kiuj respondantoj distingas, ke homo parolas dialekte, ili estas pli aŭ malpli unuecaj. Plej ofte oni indikas tri ecojn: akcentado, oni uzas aliajn vortojn, oni forglutas finaĵojn. Ankaŭ notinda estas rimarko de paralingvistikaj ecoj ĉe la naivaj taksantoj (ekz. *rapide muelas per lango, elkantas*), kelkaj ankaŭ unue asociiĝas kun dialekta parolo [Long 1999: 192-193].

Se resumi la respondojn de la respondantoj, kun kio asociiĝas al ili dialekte parolanta homo, distingiĝas tiuj ĉi stereotipoj kaj perceptaĵoj:

- 1) specifa, interesa homo;
- 2) fleganta tradiciojn;
- 3) vilaĝano,
- 4) maljuna,
- 5) malpli klera.

Kiel eblas vidi la naivaj taksantoj ne estas indiferentaj al diferencoj de paroloj kaj laŭ ili emas distingiĝi homojn kaj laŭ kultura kaj laŭ socia aspektoj. Do, apriora **perceptaĵo de dialekto** estas pli aŭ malpli pozitiva, t. e. *alia*, parte komprenebla, iom neregula, pli alloga ol malalloga parolo.

3. Finaj rimarkoj

Eksplikante, kiel formiĝas **la perceptaĵo de dialekto** F. Inoue distingis certajn faktorojn, havantajn destinan influon al formiĝo de *perceptaĵo*. Resumante la rimarkojn kaj de F. Inoue [Inoue 1999: 157–158], kaj de aliaj reprezentantojn de percepta dialektologio [Diercks 2002: 52–54] kaj rezultojn de farata esploro, estas dirinde, ke *perceptaĵon de dialekto* povas destini:

1. *la dialekto mem* – lingvistikaj datumoj;
 - a) *objektivaj* ecoj, ekzistantaj en dialekto, t.e. konkretaj en ĉiu dialekto
 - b) nur *aŭdataj* aŭ inverse *ne aŭdataj* de respondantoj pro ilia persona lingvistika sperto, lingvistikaj kutimoj (ekzemple, en konkreta kazo dum la esploro malfortaj ecoj de dialekto en parolo de kabineto por respondantoj estis preskaŭ *ne aŭdataj*);
2. Stereotipaj perceptaĵoj
 - a) kontrasto de vilaĝo – urbo;

b) sociaj antaŭjuĝoj

Dialektaj perceptaĵoj de la naivaj respondantoj ne estas enuaj kaj monotonaj. Tio estas ŝanĝiĝanta, ofte nur de subjektivaj cirkonstancoj dependanta dimensio.

Esplorado de percepto estas daŭrigata, ĉar oni celas ekscii, kiel reprezentantoj de diversaj regionoj *aŭdas* dialektajn diferencojn kaj kian *dialektan perceptaĵon* ili flegas.

Referencoj

- Preston, D. R. (1989): *Perceptual Dialectology: Nonlinguists' Views of Areal Linguistics*. Providence, RI: Foris.
- Preston, D. R. (1999). Introduction. *Handbook of Perceptual Dialectology* (ed. by Dennis R. Preston), Volume 1, Amsterdam, Philadelphia: John Benjamin's Publishing Company, xxiii–xl.
- Inoue, F. (1999). Classification of Dialects by Image. English and Japanese. *Handbook of Perceptual Dialectology* (ed. by Dennis R. Preston), Volume 1, Amsterdam, Philadelphia: John Benjamin's Publishing Company, 147–159.
- Giles, H., Bourhis, R. Y. & Davies (1975). A. Prestige Speech Styles: the Imposed Norm and Inherent Value Hypotheses. *Language in Anthropology. IV: Language in many ways*, (ed. W. C. McCormack and S. Wurm), The Hague: Mouton.
- Long, D. (1999). Geographical Perception of Japanese Dialect Regions. *Handbook of Perceptual Dialectology*, Volume 1, (ed. Dennis R. Preston), Amsterdam, Philadelphia, p. 192–193;
- Diercks, W. (2002). Mental Maps: Linguistic-Geographic Concepts. *Handbook of Perceptual Dialectology* (ed. by Daniel Long, Dennis R. Preston), Volume 2, Amsterdam, Philadelphia: John Benjamin's Publishing Company, 51–70.

Adreso de la aŭtoro

S-ino Daiva ALIŪKAITĖ
 Vilniaus universiteto Kaunas humanitarinis fakultetas,
 Muitinès g. 8,
 LT 44280, Kaunas, Lietuva
 <daiva.aliukaite@vukhf.lt>

Priaŭtora informo

La aŭtorino bakalaŭriĝis en 2000 pri litova filologio kaj en 2002 magistriĝis pri litova lingvistiko en Vilnius Universitato Kaunas Humanisma Fakultato (VU KHf). Ŝi nun pretigas en Katedro de Litova Filologio disertacion: “Diferencoj de dialekta parolo kaj la komuna lingvo: objektivaj kaj supozataj distingoĵoj”.